

Informilo de Ĝemelaj Urboj



Reta bulteno de UEA pri la projekto Ĝemelaj Urboj
10-a jaro N-ro 4 (39) decembro 2011



Novjara mesaĝo el HOU Zhiping

Ŝildo donacita de du urbestroj

Vizito de nova urbestro al nia ekspozicio

Historio, Esperanto-movado kaj ĝemelaj urboj de Bydgoszcz

Por efektiviĝi la kunlaboron

NOVAĴO

S-ro HOU Zhiping naskiĝis en 1937 kaj kontaktis Esperanton en 1963. Li estas eksa vic-prezidanto de la gazeto “El Popola Ĉinio” kaj direktoro de ĝia Esperanto-redakcio, prezidanto de la Ĉina Esperanto-Eldonejo kaj vic-estro de la Ĉina Koresponda Lernejo de Esperanto. Li aperigis grandan kvanton da artikoloj kaj fotoj pri Esperanto en diversaj gazetoj, kaj verkis nemalmultajn librojn, ekz. “La Esperanto-Movado en Ĉinio”, “Hujuz kaj Esperanto”, “Ĉinaj Esperantistoj kaj Esperanto-Movado”, “Paroladoj de Ĉinaj Famuloj pri Esperanto”, “Cent jaroj de Esperanto en Ĉinio”, “Konciza Historio de la Ĉina Esperanto-Movado” ktp. Li estas titolita en Ĉinio kiel “specialisto pri la historio de la ĉina Esperanto-movado” kaj gajnis specialan stipendion, kiun La Konsilio de la Ĉina Registaro establas por elstaraj kontribuantoj al ĵurnalismo. En februaro de 2011 li decidis rekompili sian libron “Esperantistoj en Ĉinio”. En tiu decido li klare menciis, ke ankaŭ tiuj esperantistoj, kiuj per Esperanto kontribuis al agado de ĝemelaj urboj, estis konsiderataj. Pro tio mi speciale invitis lin paroli iom al la bulteno “Informilo de Ĝemelaj Urboj” (IGU), sekve li sendis la suban mesaĝon.

La redaktoro

Novjara mesaĝo al kamarado Guojiang



Kiam alvenos la nova jaro 2012, mi speciale kore salutas vin. De multaj jaro vi ne retroiras antaŭ peniga laboro por redakti la bultenon IGU, kaj faras specialan kontribuon al interkompreniĝo kaj amikiĝo inter diverslandaj popoloj, ĉiu esperantisto dankas al vi pro tio. Kiel ĉino ĉiam studi la historion de Ĉina Esperanto-Movado mi estas fiera pri tio, ĉar tiu ĉi grava laboro estas fare de vi, ĉina esperantisto, kaj bone plenumita. Ni estas tiel ĝojaj kaj plezuraj, kaj bondeziras al vi grandan atingon en la nova jaro. Por bone funkciigi la bultenon mi havas jenajn proponojn:

Esperanto, kiel unu el la komunikiloj de la homaro, ne nur estas lingvo, sed ankaŭ ideala enkorpiĝo kun ĝia alveno. Ĝia koncepto, kiu estas disvastigata al popolo, estas, ke la homaro estu eterne amika kaj paca. Ni kune loĝas sur terglobo, kaj same estas terglobanoj. Ni devas esti reciproke intimaj kaj ami unu la alian kiel familio. IGU devas entrepreni agadon de ĝemelaj urboj kiel la unua grava tasko, kaj akceli ĝemeliĝon inter landaj asocioj kaj inter urboj, kaj sufiĉe disvolvi ligilan kaj pontan rolojn de Esperanto.

IGU devas fortigi ligojn kaj kontakton kun Esperantaj organizaĵoj en diversaj landoj, kaj ĝustatempe raportu priajn informojn kaj spertojn el diversaj landoj por plibona evoluo de la agado de ĝemelaj urboj, ekz. laŭ mi spertoj en Changzhou, Tianjin, Zhenjiang ktp. estas sukcesaj ekzemploj, kaj devas esti intervjuataj kaj raportataj.

Por vastigi influon kaj rolon de Esperanto en amikiĝo inter diverslandaj popoloj IGU devas koalicii kun famaj esperantaj retejoj en diversaj landoj, ekz. <http://esperanto.china.org.cn>, <http://www.lernu.net> ktp. kaj ĉiuj interperas koncernajn informojn kaj artikolojn krom tio, ke realiĝas ligo kun ili.

IGU devas kunlabori kun landaj asocioj, kaj preni agadon de Sendito de Amikeco kiel unu el la jaraj gravaj aktivaĵoj, kaj elektas kaj honorigas jarajn Senditojn de Amikeco. Esperantaj organizaĵoj kaj/aŭ individuaj esperantistoj, kiuj faris kontribuojn en agado de

ĝemelaj urboj kaj interŝanĝo de internaciaj kulturoj, estas konsiderataj kiel Senditoj de Amikeco, ni forte stimulas tion.

La supremenciitaj kvar proponoj estas miaj novjaraj bondeziroj al IĜU, kaj mi kore deziras, ke Informilo de Ĝemelaj Urboj povas fariĝi bona amiko de esperantistoj.

Hou Zhiping

En planataj rimedoj de MES

Progresigi la ĉiuspecajn rilatojn kaj kunlaborojn inter enlandaj kaj eksterlandaj esperantistoj kaj Esperanto-organizaĵoj kaj okazigi Esperanto-eventojn estas unu el kvar rimedoj planataj de Mongola Esperanto-Societo (MES) por siaj celoj. Partopreni en la projekto Ĝemelaj Urboj estis unue konsiderata en tiu ĉi rimedo.

El n-ro 72 Esperanto en Azio, 2011

Sperto prezentita en ISOA

De la 12a ĝis la 15a de aŭgusto 2011, iniciate de la ĉina, japana kaj korea sekcioj de ILEI, la 1-a ILEI-Seminario en Orienta Azio (ISOA) okazis en la renoma Tianjin Fremdlingva Universitato en Ĉinio, kun pli ol 70 partoprenantoj el Koreio, Japanio, Mongolio, Brazilo kaj Ĉinio. Prezentante sian sperton pri instruado de Esperanto en diversaj lernejoj s-ro Zhang Changsheng el Ĉinio menciis praktikon por ĝemeliĝi Dongfang Elementan Lernejon kun Yosumi Elementa Lernejo en la japana ĝemelurbo Takatsuki.

En raporto de la estraranino

S-ino Maritza GUTIÉRREZ GONZÁLEZ, estrarano de UEA pri landa kaj regiona agado, menciis diskuton pri ĝemelaj urboj en sia raporto "Eĥoj de niaj kongresaj laboroj".

El n-ro 11 Esperanto, 2011

URBESTRO KAJ ESPERANTO

Granda helpo de urbestro al E@I



Danke al la kunlaboro kaj helpo de la urbodomo, ĉefe la urbestro s-ro Jozef BOŽIK la 1-an de julio 2011 la societo E@I (Edukado@Interreto) havas sian oficejon, ĉambro de 60m² por laborado de kvin personoj, en la urbo Partizánske. La ejo estas al E@I disponigita kontraŭ simbola unu eŭro jare. En aŭgusto okazis oficiala akcepto de E@I-teamo ĉe la urbestro. Peter BALÁŽ, Jevgenij GAUS kaj Erin PIATESKI dankis al s-ro Jozef Božik pro la malavara disponigo de la oficejo, kaj la urbestro persone konfirmis sian apogon al Esperanto kaj al la agado de E@I. Li esprimis sian deziron en proksima estonto ankoraŭ pli intense kunlabori kaj videbligi Esperanton en la urbo, kaj la urbon inter la

esperantistoj. La foto montras tiun akcepton: de maldekstre Peter Baláž, Erin Piateski, Jevgenij Gaus kaj la urbestro Jozef Božik.

El n-ro 10 (204) La Ondo de Esperanto, 2011

Ŝildo donacita de du urbestroj



La 24-an de septembro 2011 tri reprezentantoj de Breŝa Esperanto-Grupo (Daniella BRANCHI, Olha VDOVIČENKO kaj Luigi FRACCAROLI) partoprenis laŭ invito en regalceremonio, aranĝita de la breŝa urbestro Adriano PAROLI en la salono Vanvitelliano de la breŝa urbodomo palaco Loggia, por akcepti la novan urbestron de Darmstadt, Jochen PARTSCH, okaze de la dudekjariĝo de la ĝemela rilato.

En la ceremonio estis invititaj ankaŭ reprezentantoj de Troyes (FR) kaj Chesterfield (UK), aliaj Darmstadt-aj ĝemelurboj, kaj de multaj el la asocioj aktivaj por la ĝemeliĝo.

Luigi Fraccaroli, la prezidanto de la grupo, estis donacita per ŝildo memore al la ĝemeliĝo. Dum la transdono estis legita la kialo por la donaco. La tema foto montras tiun okazon: de maldekstre Adriano Paroli, Luigi Fraccaroli kaj Jochen Partsch.

Dum la bufedo la prezidanto havis mallongajn interparolojn kun la urbestro de Darmstadt, kiu deziris bonan estonton al la rilato inter BEG kaj la E-Grupo de Darmstadt, kaj kun reprezentanto de Troyes, kiu konas la prezidantinon de la tiea E-Grupo, Michèle GUINGOUIN. Daniella kaj Olha akiris de la skabeno kaj de unu el la du funkciulinoj duonpromeson pri lernado de Esperanto.

Luigi Fraccaroli

Monda Pupekspozicio per Esperanto



La 1-an de oktobro 2011 estis inaŭgurita la ‘Monda Pupekspozicio per Esperanto’ en Izucu Yaŝiki –sidejo de la Nova Turisma Asocio en la japana urbo Higashikagawa.

La ekspozicio klare montris la gravecon de kulturaj interŝanĝoj, ĝin prezentis 25 artikoloj en la gazetaro de 11 landoj el 4 kontinentoj. Ekster la ekspoziciejo la gastoj estis bonvenigataj de 22 aliĝlandaj flagoj kaj interne apud kartona terglobo troviĝis Esperanto-flago por montri, ke la kolekto estis farita danke al Esperanto-parolantoj.

Dum 10 tagoj estis ekspoziciitaj 630 pupoj el Japanio, Afriko, Orienta Eŭropo kaj Sudameriko. Unu el la plej valoraj kontribuoj estis faritaj de Vlad’ka CHVATÁLOVÁ, ĉeĥa esperantisto laboranta kiel EU-interpretisto kaj gvidanto de la orfejo ‘Nabouba’ en Benino. Ŝi kolektis 52 interesajn pupojn el Benino, Ganao kaj Togolando kaj grandpakaĝe ilin portis al Belgio kaj de tie sendis al Japanio.

Kiel s-ino Jadwiga Maria RODOWICZ-CHEWOSKA, la ambasadorino de Pollando en



Japanio, asertis, ke la ekspozicio ‘certe estos sukcesa kaj kontribuos al la daŭra interpopola interkompreniĝo’. Proksimume 10 000 homoj vizitis ĝin, i.a. s-ro FUJII Hideki, la urbestro (vidu foton), kaj la ĉefaj amaskomunikiloj (NHK, Yomiuri, Asahi, Nihon Keizai, ktp.) ĉeestis la inaŭguron. Krome la Ambasadoro de Argentino en Japanio, s-ro Raúl DEJEAN, sendis gratulmesaĝon.

El raporto de Etsuo Miyoshi, prezidanto de la Nova Turisma Asocio

Vizito de nova urbestro al nia ekspozicio

La Nacia Kultura Festotago estas kultura evento de la japana urbo Takatsuki kaj okazas ĉiu-aŭtune. Ni, Esperanto-Societo en Takatsuki (EST), per la Esperanta ekspozicio partoprenis en ĝi jam 46-foje sen interrompo.

Interŝanĝo kaj fruktoj atingitaj inter ĝemelaj urboj estas nemankebla enhavo de la ekspozicio. Ekde 1986, kiam komenciĝis amika rilato kun Changzhou-a Esperanto-Asocio troviĝanta en la ĉina ĝemelurbo Changzhou, ni montradas en ĝi interŝanĝon kun la asocio. Interalie interŝanĝo inter Yosumi Elementa Lernejo de Takatsuki kaj Dongfang Elementa Lernejo de Changzhou interesas vizitantojn de la ekspozicio. Ambaŭ urbaj esperantistoj kunlabore helpadas la interŝanĝon. Foje kaj foje urbestro mem vizitas nian ekspozicion kaj tio utilas, ke la urbodomo agnoskas nian movadon kaj Esperanton. Kiam ni okazigas ekzemple kongreson de Esperanto, municipo rezervas avantaĝe bezonatajn ĉambrojn por ni. Kaj urbestro mem ĉeestas en la kongreso kaj salutas al la partoprenantoj.

Ĉi-jare la ekspozicio okazis de la 1-a ĝis la 3-a de novembro. Kiel montrite en n-ro 36 IĜU, ni rekomunikiĝis kun Toowoomba Esperanto-Societo en ĝemelurbo Toowoomba (Aŭstralio) kaj montris mesaĝon kaj fotojn el la societo same kiel tion el Changzhou. Nova urbestro s-ro HAMADA Takeshi kaj parlamentano s-ino TSUJIMOTO Kiyomi (la kvara de maldekstre sur la foto) vizitis nian ekspozicion. Ĝin montras la hejmpaĝo: <http://www.geocities.jp/fdtsh088/ekspo-2011.html>

Raportis NAKATU Masanori



Ekspozicio

vizito de nova urbestro

vizito de la parlamentanino

Urba stilo kaj trajto



Urba historio

Bydgoszcz [pron. Bidgoŝĉ] estas urbo en nordcentra Pollando, situanta proksime de la enfluejo de la rivero Brda. Ĝi estis fondita en 1038. Germanaj loĝantoj nomis ĝin Bromberg laŭ rivero Brda, polaj loĝantoj uzis la nomon de la proksima kastelo Bidgost. Nun ĝi estas unu el du ĉefurboj de la Kujavia-Pomeria Provinco (la dua estas proksima Toruń) kaj sidejo de provincestro, ankaŭ unu el la pli grandaj polaj urboj - la oka laŭ nombro de enloĝantoj (357 650) kaj la deka laŭ areo (175,98 km²). Ĝi estas grava centro ekonomia, kultura, akademika, medicina, armea, sporta kaj ankaŭ trafika - ŝosea, fervoja, ŝipvetura kaj aviadila; en Bydgoszcz troviĝas rivera haveno kaj internacia flughaveno.

Peza industrio kaj aparatkonstruo estas ĝiaj apogilaj industrioj, ekz. PESA, kompanio produktanta tramojn kaj elektrotrajnojn. Turismo, precipe Esperanto-turismo, ankaŭ estas brila punkto.

Esperanto-movado

La Esperanto-movado en Bydgoszcz komenciĝis en la unuaj jaroj de la 20-a jarcento. Grupo de samideanoj de Esperanto fondis Esperanto-asocion en 1908. Tie troviĝas kelkaj Zamenhof/Esperanto-Objektoj, Internacia Studumo pri Turismo kaj Kulturo (klerigejo de la Akademio Internacia de la Sciencoj), kie oni povas studi turismon kaj kulturon en Esperanto, kaj sidejo de Kujavia-Pomeria Filio de Pola Esperanto-Asocio. Tie agadas ankaŭ du Esperanto-kluboj: Internacia Klubo "Esperantotur" kaj Klubo de Nevidantaj Esperantistoj "Esperanta Amiko". Dum longa periodo Bydgoszcz estis kaj estas grava centro de la pola Esperanto-movado, precipe en la kampoj eldona, instruista kaj vojaĝa. En 2010 aperis libreto "Esperanto en Bydgoszcz - Pli ol 100 jaroj" (ISBN 978-83-62323-05-0), kiu priparolas la historion de la Esperanto-movado en Bydgoszcz. Ĝi estas aĉetebla en la libroservo de UEA kaj ankaŭ legebla rete.

Ĝemelaj urboj

Bydgoszcz oficiale ĝemeliĝis kun tiuj urboj: Ningbo en Ĉinio, Mannheim kaj Wilhelmshaven en Germanio, Patraso en Grekio, Reggio Emilia en Italio, Pavlodar en Kazahio, Pitesti en Rumanio, Kragujevac en Serbio, Perth en Skotlando, Ĉerkaso kaj Kremenĉuko en Ukrainio kaj Hartford en Usono. Krome ĝi tenas amikecajn aŭ kunlaborajn rilatojn kun tiuj urboj: Tuluzo en Francio, Granado en Hispanio, Eindhoven en Nederlando kaj Arviko en Svedio. La foto montras simbolon de ĝiaj ĝemelurboj en la teatra placo.



El vikipedio kaj <http://www.esperanto.bydgoszcz.eu>

SERVA PLATFORMO

Por efektiviĝi la kunlaboron

La oficiala celo de ĝemelurba kunlaboro estas antaŭ ĉio plivastigi perspektivojn kaj subteni internacian amikecon. Pere de proksimaj kontaktoj oni kontribuas al paco kaj amikeco. Ĝemel-urba kunlaboro inter du komunumoj estas speciala rilato. Estas deziro interŝanĝi spertojn kaj ideojn, amikiĝi, viziti unu la alian kaj diskuti pri komunaj interesoj. Esperanto estas bona rimedo atingi tiun celon. Ni esperantistoj povas kontakti la komunumajn aŭtoritatulojn kaj oferti nian helpon por superponti lingvajn malfacilaĵojn.

Krom ĝemelurba kunlaboro kelkaj urboj havas apartajn projekt-kunlaborojn. Jen estas listoj de ĝemelurboj de Helsingborg kaj de Ängelholm.

Loko/Klubo en Svedio	Ĝemelurboj en aliaj landoj
Helsingborg	Xiamen en Ĉinio, Helsingör en Danio, Pärnu en Estonio, Dubrovnik en Kroatio kaj Alexandria en Usono
Ängelholm	Høje-Tåstrup en Danio, Dobeles en Latvio kaj Kamen en Germanio

En majo 2012 Svedio havas sian landan esperantokongreson en majo 2012 en Elsinburgo. Pro tio ni serĉas esperantistojn en niaj ĝemelurboj, tiel ke ni povus inviti ilin al la kongreso.

Svedio jam delonge nomumis kelkajn lokojn ĝemelurboj. Kontaktoj inter la lokaj kaj regionaj komunumoj ĉefe estis pere de la angla lingvo. Nun estas tempo por la reprezentantoj de la landoj aŭ trovi esperantistojn aŭ lerni esperanton por efektiviĝi la kunlaboron.

Se troviĝas esperantisto en iu el la supren menciitaj urboj, bonvolu kontakti Kaisa HANSEN (kaisa@esperanto.se), Komisiito pri ĝemelurbaj kontaktoj de Sveda Esperanto-Federacio, aŭ Ann-Louise ÅKERLUND (al_akerlund@yahoo.se) en Elsinburgo.

Informo el Tanzanio

Mi loĝas kaj estras 4 vilaĝojn, kiuj kune fondas unu vilaĝaron en la nordokcidento de Tanzanio proksime de la granda lago Viktorio. Urboj ĉie en la mondo kiuj pretas ĝemeliĝi kun mia vilaĝaro, kontaktu min, Mramba Simba (smbmramba@yahoo.com)

Funkciuloj de la projekto

S-ro Probal DASGUPTA, prezidanto de UEA

S-ino Maritza GUTIÉRREZ GONZÁLEZ, estraranino de UEA pri landa kaj regiona agado

S-ro Osmo BULLER, ĝenerala direktoro de UEA

S-ro WU Guojiang, komisiito de la projekto

Redakcio de Informilo de Ĝemelaj Urboj

Redaktoro: s-ro Wu Guojiang, Fushun Shiyoyichang Yanjiusuo, CN-113008, Fushun Liaoning Ĉinio; Telefono kaj

Fakso: +86-413-2650322; Retadreso: ghemelurboj@yahoo.com.cn amikeco999@21cn.com

Provlego: s-ro Robert BOGENSCHNEIDER, retadreso: robog@gmx.de